



'Nova Urbo'

UNUECO TRANS ĈIUJ KULTUROJ

> ni Pontu <

Komponistoj de amikeco

Fine de la ĉi-jara februaro realiĝis projekto inter Gen-4 (la plej junaj membroj de Fokolara Movado) kaj Societo Sonore Forme (S.S.F.)

Dum la metiejo renkontiĝis porinfanaj komponistoj kaj ĉirkaŭ 100 parto-prenantoj el kelkaj kontinentoj.



Ĝi okazis kadre de la Gen-4 aktivado kaj celis komprenigi muzikan kunlaboron por infanoj.

Unue oni koncentriĝis je homoj kiuj komprenas muzikon kaj laboras kun infanoj. Ĉi tiu projekto inkludis la retan trejnadon por 100 homoj el ĉiuj kontinentoj.

Ĝi fokusie je komponado de porinfana muziko – ne nur laŭ teknika vidpunkto, sed kiel rimedo por transdoni valorojn de kundivido, zorgo pri universala amikeco kaj sentoj de unuiĝo.

Laŭdata kaj insultita




William Kurelek vekis malsamajn emociojn, kiuj montris klaran dividon de la socio rilate al art-gustoj, estetiko kaj moraleco. Fakte liaj bildoj konfliktis kun tiutempaj abstraktaj tendencoj, Malgraŭ tio, lia pentraĵoj pli popularas en la nuntempa vivo ol postmoderna modo, senlime plurisma kaj promocianta ĉiuspecan elscentrecon.

Se vi volas pacon

Donatella estas fikolarino el urbo Pistoia (okcidenta Italio). Ŝi vivas en Ukrainio kaj respondis al intervjuo de itala novaĵ-agentejo "Sir". Ekde pluraj semajnoj oni parolis en Kievo pri milito kaj supozis pri baldaŭa sieĝo de la urbo. Tio ŝajnis nereala – ĝis la tago kiam okazis pafado. Dum la menciita intervjuo ŝi rakontis pri siaj travivaĵoj.




Sed estas ankoraŭ alia flanko de la konflikto,
kion prisilentas preskaŭ ĉiuj amaskomunikiloj



Laŭ la Ministerio de Vero ...

*En tempoj
de organizita
trompado,
diri la veron
fariĝas ago
revolucia.*

(Salutojn de G.Orwell)



Por ne limiĝi je priskribado de malbonaĵoj, ni fariĝu aktivaj per: Esperantaj Pac-Iniciatoj. La unua videblas ĉe : <https://familiaro.com/se-vi-volas-pacon> .

La Torĉo – Olimpikaj impresoj

Laste ni povis observi du strangajn Olimpikajn Ludojn en tre mallonga tempo. La 32-an someran olimpikon organizis japanoj en sia ĉefurbo Tokio – duafoje (antaŭe ĝi okazis tie en 1964). Kaj nur post jarduono estis organizita la 24-a vintra olimpiko en Pekino, ankaŭ duafoje. Tamen la ĉina ĉefurbo estis unusola, en kiu okazis ne nur vintra (ĉijare), sed ankaŭ la 29 somera olimpiko en 2008.



La fotoj supre: 1. Afrika Gano sendis nur kelk-personan teamon; 2. Therese Johoug venkis 3 orajn medalojn por Norvegio; 3. La nekutima heroo estis ĉi-jare kanada Max Parron, kiu sukcese batalis kontraŭ kancero kaj en Pekino venkis oran medalon en neĝ-tabulado.

En lasta februaro al Pekino venis preskaŭ 2900 sportistoj, kiuj partoprenis en 109 konkurencoj, grupigitaj en 14 disciplinoj. Ili venis el 91 landoj, eĉ tropikaj kiel Bolivio, Filipinoj, Haitio, Jamajko kaj Magadaskaro. Kiel kutime, en tiu plej granda sporta festivalo okazis multe da personaj historioj: ne nur ĝojo de la venkintoj sed ankaŭ larmoj de kelkaj aliaj.



FORTOJ de la VIVO

La unua paŝo

Kiam mi estis en aĝo mezlerneja, mi ne plu povis konsenti kun mia patro. Tio lin tre suferigis, tamen nie kapablis trovi solvon por tio. Mia sinteno estis ŝanĝota post unu veturo kun mia amiko, kiu aktivis en familiaj rondoj. Li konsilis, ke troviĝante en malfacila situacio mi une demandu min mem: “Se mi ne kapablas ami tiun konkretan homon, tiam kiu alia faru tion anstataŭ mi?” Revenante hejmen, tiuj ĉi vortoj sonis forte en miaj oreloj.

Mirinde, al mia memoro revenis multaj okazoj kiam mi povus montri amon al miaj gepatroj sed mi ne faris tion. Por kompensi tion, mi decidis komenci per malgrandaj agoj, helpante en tiuj aferoj, kiujn mi kutimis eviti. Rezulte, gravaj ŝanĝoj aperis ankaŭ en mia vivo. De tiam pasis dudek jaroj, nun ankaŭ mi havas infanojn. Kaj la tiama travivaĵoj instruas min konstante, kiel grava estas la kuraĝo fari la unuan paŝon celante al repaciĝo. Kvazaŭ feliĉo de alia persono dependus nur de mi.
(R.T. - Hungario)



Senkondiĉa amo

Ekde sufiĉe longa tempo mia edzino kaj mi kverelis pli kaj pli ofte. Kiu scias kial? Eĉ la plej malgranda eraro aŭ malĝusta vorto, io tute negrava kaŭzis laŭtigon de niaj voĉoj venigante malnovajn domaĝojn / bedaŭrindaĵojn. Dum unu el tiaj vesperoj, kiam atmosfero inter nifariĝis denove streĉa, mi ekvidis nian naŭjaran filinon sidi sur la ŝtuparo kaj ŝajnis ludi per paperaj aviadiloj. Ŝi ridetis, same kiel nia pli juna filon. Ambaŭ aspektis ĝui sian ĉeeston. Nia eta duopo kaptis mian atenton.

Mi kaptis kelkajn el tiuj aviadiloj kaj montris ilin al mia edzino. Ni ekvidis, ke ĉiu aviadilo farita de niaj infanoj havis desegnititan koreton kun mesaĝo kiel “Ni amas vin multe”, “Vi estas la plej bonaj gepatroj en la tuta mondo!”, “Ni volas aŭdi, ke vi kantas”. Tio atentigis mian atenton, do mi prenis kelkajn el la paperaj aviadiloj kaj montris ilin al mia edzino. De proksime ni povis vidi, ke ĉiu aviadilo estis ornamita per koretoj kaj mesaĝoj kiel "Ni amas vin multe", "Vi estas la plej bonaj gepatroj en la mondo!", "Ni volas aŭdi vin kanti!". Mia edzino legis la frazetojn kaj mi rimarkis larmojn flui sur ŝiaj vangoj. Ni rigardis unu la alian kaj hontis pro nia konduto. Per kunbrakumo ni decidis trovi nian unuan “jes” diritan antaŭ jaroj, kiam nia unua amo ekfloris.
(M. - Portugalio)

Kompilis Maria Grazia Berretta